

Konvena regado. La homaro survoje al justa tutmonda sistemo

Deklaro de Bahaa Internacia Komunumo
okaze de la 75jariĝo de la Unuiĝintaj Nacioj

La 75jariĝo de la Unuiĝintaj Nacioj okazas dum rapide ŝanĝiĝantaj tutmondaj realaĵoj igas pli profunde aprezi la interligitecon kaj interdependecon de la homaro. Meze de la perturboj kreitaj kaj akcelitaj de la mondon inundanta pandemio, estiĝas multnombraj eblecoj por signifaj sociaj ŝanĝoj povantaj la mondon stabiligi kaj la vivojn de ĝiaj loĝantoj riĉigi. Tra la tuta historio prezentis periodoj de tumulto ŝancojn redifini kolektivajn valorojn kaj la premisojn sur kiuj ili baziĝas – tiel ankaŭ la nuna momento. Ke en tuta aro da sferoj necesas radikale transformi establitaĵojn kaj alirojn sugestas kiel gravega estos la venonta kvaronjarcento etendiĝanta de la 75a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj ĝis al ties centjariĝo por determini la sorton de la homaro. Kreskanta ĥoro da voĉoj vokas al decidaj paŝoj antaŭen je nia kolektiva trajektorio voje al daŭra, universala paco. Estas voko nepre respondenda.

La homa familio estas unu. Tio ĉi estas tutmonde kaj multnombre adoptita vero. Ĝiaj profundaj implicoj por nia kolektiva konduto devas nun generi kunordigitan movadon voje al pli altaj niveloj de socia kaj politika unueco. Kiel deklaris Bahá' u'lláh antaŭ pli ol jarcento: “Vera paco kaj trankvilo realiĝos nur kiam ĉiu animo estos fariĝinta la bondeziranto de la tuta homaro.” Tro grandas la danĝeroj de tutmonda komunumo dividita kontraŭ si mem ol ke eblus ilin toleri.

La pasinta jarcento vidis multajn paŝojn – neperfektajn, tamen gravajn – por meti la fundamenton de monda sistemo kapabla sekurigi internacian pacon kaj ĉies prosperon. La unua serioza provo de la homaro ekhavi tutmondan regosistemon, la Ligo de Nacioj, 25 jarojn daŭris. Imponas ke la Unuiĝintaj Nacioj tion jam triobligis. Efektive estas ĝi strukturo unike kuniganta ĉiujn landojn de la mondo kaj forumo en kiu esprimiĝas la komuna volo de la homaro. Lastatempaj eventoj tamen montras ke fronte al kaskade sin sekvantaj kaj ĉiam pli interligitaj minacoj ne plu sufiĉas la nunaj aranĝoj. Devas tial pli ampleksiĝi integriĝo kaj kunordigo. La sola vivkapabla vojo antaŭen troviĝas en sistemo de profundiĝanta tutmonda kunlaboro. La nuna datreveno estas ĝustatempa momento por ekinterkonsenti pri kiel la internacia komunumo povas pli bone sin organizi, kaj por konsideri la normojn per kiuj progreso estu mezurata.

Rezonan kritikon de multflankaj internaciaj interkonsentoj dum la lastaj jaroj foje eklipsis malakcepto de la ideo mem de regulita internacia sistemo. Tiu ĉi retropuŝa periodo tamen enkadriĝas en pli larĝaj historiaj procezoj portantaj la tutmondan komunumon al pli fortika unueco. Je ĉiu stadio de la homa historio ne nur eblas sed estas necesaj ĉiam pli kompleksaj niveloj de integriĝo. Ekaperas novaj kaj pli premaj defioj kaj devigas la politikon elpensi novajn aranĝojn kapablajn kontentigi la tiutempajn bezonojn helpe de plia inkluziveco, kohereco kaj kunlaboro. La postuloj de la nuna momento puŝas la ekzistantajn strukturojn trans sia kapablo efike provizi internaciajn traktadojn kaj sistemojn por solvi konfliktojn. Tial ni tro-

viĝas sojle de decida tasko: celtrafe organizi niajn aferojn en la plena konscio ke ni estas unu popolo en unu komuna hejmlando.

*

Agnoski la unuecon de la homa familio ne estas postuli unuformecon aŭ rezigni pri la vasta gamo da establitaj regosistemoj. Vere aprezi la unuecon de la homaro inkluzivas la esencan koncepton de diverseco. Bezonatas hodiaŭ firma interkonsento enkorpiganta – dum konservas ĝi la diversajn sistemojn kaj kulturojn tra la mondo – aron da komunaj valoroj kaj principoj kapablaj varbi al si la subtenon de ĉiu nacio. Certagrada interkonsento pri tiuj ĉi komunaj principoj kaj normoj jam percepteblas en la idealoj karakterizantaj tutmondajn tagordojn – kiel la universaleco de homaj rajtoj, la imperativo elimini malriĉecon aŭ la neceso vivi ene de limoj ekologie daŭripovaj. Sed estas pliaj paŝoj farendaj. Kaj necesas esti preparita por la defiaj implicoj de tiaj idealoj.

Kadra sistemo favoranta diversecon da aliroj kaj sin apoganta sur sindevontigo al unueco kaj komuna etiko de justeco, permesus ke praktike aplikiĝas komunaj principoj en senombraj aranĝoj kaj formuloj. Ene de tia kadro diferencoj en la politika strukturo, justico kaj socia organiziĝo ne prezentus antagonismojn sed fontojn por eble trovi novajn solvojn kaj alirojn. Tiagrade kiel nacioj sin devontigas lerni unu de alia povas enradikiĝintaj kutimoj de konkuro kaj kulpigado anstataŭiĝi per kulturo de kunlaborado kaj esplorado en kiu regresoj kaj mispaŝoj bonvole akceptiĝas kiel neeviteblaj aspektoj de la lernado.

Vera agnosko de tutmonda interdependeco necesigas vere zorgi pri ĉiuj – sen distingo. Tiu ĉi trompe simpla principo implicas profundan reordigon de prioritatoj. Tro ofte la avanco de la komuna bono estas konsiderata kiel duaranga celo – laŭdinda, sed alstrebata nur post kiam aliaj, pli mallarĝaj naciaj interesoj estas kontentigitaj. Ĉi tio devas ŝanĝiĝi, ĉar la bonfarto de ajna parto de la homaro nedisigeble ligiĝas al la bonfarto de la tuto. La deirpunkto por interkonsiliĝado pri ajna programo aŭ politiko devas esti la demando kiajn efikojn tiu havos je ĉiuj partoj de la socio. Kiam ili pritaksas la utilecon de proponita faro – ĉu loka, nacia aŭ internacia – gvidantoj kaj politikistoj sekve frontas decidan demandon: ĉu ĝi antaŭenigos la bonfarton de la homaro kiel tuto?

Kia ajn utilo rezultis el pasintaj konceptoj de ŝtata suvereneco – la nunaj kondiĉoj postulas multe pli tutecan kaj koheran aliron al analizoj kaj decidoj. Kiaj estos la tutmondaj implicoj de hejmlandaj politikoj? Kiuj decidoj kontribuos al komuna prospero kaj daŭripova paco? Kiuj opcioj nutras noblecon kaj gardas homan dignon? Kiam konscio pri la unueco de la homaro ĉiam pli integriĝas en decidoprocezoj, tiam nacioj trovos pli facile vidi unu la alian kiel verajn partnerojn je la prizorgado de la planedo kaj sekurigado de la prospero de ĝiaj popoloj.

Kiam gvidantoj konsideras la efikon de io farota, devas ili ankaŭ konsideri kion tiel multaj eble nomas la homan spiriton – tiu esenca eco kiu serĉas signifon kaj aspiras transcendon. Tiuj malpli percepteblaj dimensioj de homa ekzistado kutime konsideratas kiel apartenantaj al la sfero de persona kredo kaj troviĝantaj ekster tio koncernanta politikistojn kaj administrantojn. Sed la sperto montris, ke progreso por ĉiuj ne atingeblas se materia avancado estas separita de spirita kaj etika avancado. La ekonomia kreskado dum la lastaj jardekoj,

ekzemple, nedisputeble alportis prosperon por multaj. Sed ĉar tiu kreskado ne ligiĝis al justeco kaj egaleco, misproporcie profitis de ĝiaj fruktoj iuj malmultaj dum troviĝas multaj en embarasaj kondiĉoj. Tiuj vivantaj en malriĉeco pleje riskas fariĝi viktimo de ajnaj ŝrumpoj de la monda ekonomio, ŝrumpoj kiuj pliseverigas ekzistantajn malegalecojn kaj intensigas suferadon. Ĉiu klopodo antaŭenigi la socion, eĉ se ĝi koncernas nur la materiajn kondiĉojn, sin apogas sur fundamentaj moralaj premisoj. Kaj en ĉiu politiko speguliĝas konvinkoj pri la homa naturo, pri la valoroj servantaj diversajn sociajn celojn, kaj pri kiel ekzistantaj rajtoj kaj responsoj reciproke sin influas. Ĉi tiuj premisoj determinas kiagrade decido generos universalan utilon. Tial devas ili esti zorge kaj sincere ekzamenataj. Sole per la certigo ke materia progreso estas konscie konektita kun spirita kaj socia progreso povas plenumiĝi la promeso de pli bona mondo.

*

Moviĝo al pli kunordigitaj kaj vere kunlaboraj internaciaj rilatoj fine necesigos procezon per kiu la mondaj gvidantoj kunvenas por novorganizi kaj novstarigi la tutmondan sistemon. Ĉar, sub la evidentaj kaj seriozaj defioj frontantaj la homaron, fariĝis pragmata neceso kio iam estis konsiderata kiel idealisma vizio de internacia kunlaboro. La efikeco de paŝoj en ĉi tiun direkton dependos de tio, ke trivitaj agmanieroj, pataj kaj sakstrataj, anstataŭiĝos per tutmonda civitana etiko. Interkonsiliĝaj procezoj devos fariĝi pli grandanimaj, raciaj kaj varmkoraj – motivitaj ne per ligiteco al profunde enradikiĝintaj pozicioj kaj stretaj interesoj, sed per la kolektiva klopodo pli profunde kompreni kompleksajn demandojn. Celoj neakordigeblaj kun servado al la komuna bono devos esti flankenmetataj. Ĝis kiam tio ĉi estos fariĝinta la reganta etiko montriĝos ke apenaŭ atingeblas daŭra progreso.

Tia sinteno emfazas aliron al progreso orientiĝanta je procezoj, apogiĝanta paŝon post paŝo sur propraj fortoj kaj reaganta al novformiĝantaj kondiĉoj. Kaj kiam kreskas la kolektiva kapablo racie kaj senpartie ekzameni la indon de iu farita propono, meritos gamo da reformoj pli profundan konsideradon. Ekzemple establi duan ĉambron de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, al kiu reprezentantoj estas rekte elektitaj – tiel nomata monda parlamenta asembleo –, povus multe kontribui al plifortigo de la legitimeco de tiu tutmonda institucio kaj al pli konekti la homojn kun ĝi. Monda konsilio pri estontaj aferoj povus instituciigi konsideradon de kiel politikoj efikas venontajn generaciojn kaj doni atenton al aro da temoj kiel la prepariĝo por tutmondaj krizoj, la aplikado de novaperantaj teknologioj aŭ la estonteco de edukado aŭ dungado. Fortigo de la jura kadro rilate la naturon farus pli kohera kaj viva la reĝimojn por konservi biologian diversecon, la klimaton kaj la medion, kaj provizus fortikan fundamenton por sistemo de komuna responso kaj prizorgo de la planedaj resursoj. Reformo de la ĝenerala infrastrukturo por antaŭenigi kaj daŭripovigi pacon, inkluzive de reformo de la Sekureca Konsilio mem, ebligus ke konataj aranĝoj paralizaj kaj blokiĝaj cedas al pli decida reago al la minacantaj konfliktoj. Tiaj iniciatoj aŭ kompareblaj novigoj necesigus multan fokusan interkonsiliĝadon kaj favore al ĉiu el ili bezonatus ĝenerala interkonsento por ke ili povu akceptiĝi kaj leĝiĝi. Ili kompreneble ne en si mem sufiĉus por kontentigi la bezonojn de la homaro; tamen, laŭ la grado ke ili estas plibonigoj kompare kun tio ekzistanta hodiaŭ, povus ĉiu el ili fariĝi ero kontribuanta al kresko- kaj evoluoprocezo vere transforma.

La mondo kiun konstrui la internacia komunumo sin devontigis – en kiu ekzemple perforto kaj korupto anstataŭatos per paco kaj kompetenta regado, kaj en kiu la egaleco de virinoj kaj viroj estos penetriĝinta en ĉiun angulon de la socia vivo – ankoraŭ neniam ekzistis. Progresi survoje al la celoj enkorpiĝintaj en tutmondaj tagordoj sekve necesigas konscie direktiĝi al eksperimentado, serĉado, novigado kaj kreivo. Dum disvolviĝas ĉi tiuj procezoj, devas esti pli kaj pli fidele aplikata la etika kadro jam difinita en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj. Respekto al la internacia juro, gardo de la fundamentaj homaj rajtoj, observado de traktatoj kaj interkonsentoj – nur laŭ la grado de kiel tiaj sindevontigoj estas praktike honorataj povas la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj membroŝtatoj elmontri nivelon da integreco kaj fidindeco al la popoloj de la mondo. Sen tio neniomaj administraj reorganizoj solvos la aron da defioj, kiujn delonge ni alfrontas. Kiel deklaris Bahá'u'lláh: “Vortojn devas subteni faroj, ĉar faroj estas la vera pruvo de vortoj.”

*

La jaroj finantaj la unuan jarcenton de la Unuiĝintaj Nacioj prezentas periodon de grandegaj ŝancoj. Je gradoj pri kiuj pasintaj tempoj nur povis revii eblas kunlaboro ekestiganta senkomparajn perspektivojn al progreso. Tamen, nesukceso atingi aranĝon, kiu favoras efikan tutmondan kunordigon, riskas konsekvencojn multe pli severajn – eble eĉ katastrofajn – ol tiujn rezultintajn el lastatempaj perturboj. Tial la komunumo de la nacioj frontas la taskon certigi ke la maŝinaro de la internacia politiko kaj potenco pli kaj pli direktiĝas al kunlaboro kaj unueco.

Ĉu ne je la centjariĝo de la Unuiĝintaj Nacioj eblu al ĉiuj loĝantoj de nia komuna hejmlando fidi, ke ni lanĉis realisman procezon por konstrui tiun tutmondan sistemon kiu bezonatas por dum la venontaj jarcentoj garantii progreson? Tio ĉi estas la espero de la Bahaa Internacia Komunumo kaj la celo por kiu ĝi laboras. Ni eĥas la klaran pledon antaŭlonge eldiritan de Bahá'u'lláh pri la gvidantoj kaj arbitraciantoj de homaj aferoj: “Ili kune interkonsiliĝu kaj pere de zorgaj kaj plenampleksaj konsideradoj apliku al malsana kaj dolore afliktita mondo la de ĝi bezonatan kuracilon.”

Kopirajto 2020 Bahaa Internacia Komunumo

Bahá'í International Community
866 Unuited Nations Place, Suite 120
New York, NY 10017, USA

Esperanto-traduko: Bahaa Esperanto-Ligo, <https://bel.bahai.de>, bel@bahai.de